



14:3

# AMERIKA ESPERANTISTO



LA NAŬA KONGRESO  
Bern 24-31 Aŭgusto

OCTOBER, 1913

# SCHOOL AUTHORITIES

DESIRING COMPETENT TEACHERS OF ESPERANTO

or of any other subject should communicate with us. We have on our lists capable teachers for every grade and kind of position in both public and private schools. No fee to employers.

# ALL PROGRESSIVE TEACHERS

who wish to secure a better position should write to us. No fee till position is accepted.

WRITE TODAY

LEWIS TEACHERS AGENCY 51 Lyman Block  
MUSKEGON, MICH.

## Short-Story Writing

A course of forty lessons in the history, form, structure, and writing of the short-story taught by J. Berg Esenwein, Editor of Lippincott's Magazine.



Story writers must be *made* as well as *born*; they must master the habits of construction if they would attract students to copy.

Mr. Esenwein is the name of students and graduates who have signed it. And the necessity that

it is a work of letters, it is *practical*. It is a practical, accepted means of tests and checks from

*One student writes: "I know that you will be glad when I tell you that I have just received a check for \$25 from Lippincott's for a hundred dollars, twenty for more. This is the very best, and even more so, than Dr. Esenwein."*

Write for course material, *Short-Story Writing*, Volume 1, by J. Berg Esenwein, in all over One Hundred Fifty Short-Story Lessons. It is available in Harvard, Cornell, and elsewhere.

*Please address:*  
**THE HOME CORRESPONDENCE SCHOOL**

Dept. 542 Springfield, Mass.



STANDARD EDITION, Cloth Bound  
Postpaid for \$1.00; with NEW  
Subscription to AMERIKA ESPERANTISTO  
\$1.50.

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.  
West Newton, Mass.



## THE AMERICAN THEOSOPHIST

*A magazine dealing with Theosophy and Occultism, Universal Peace and Water-Tolerance.*

Official Organ of The American Section of The Theosophical Society

Mrs. Annie Bryant President Albert P. Warrington Gen. Secretary and Editor  
\$1.50 a year Single Copy 50 cents Foreign 2.00  
Address: Kristofa, D. Box 111, S. Angeles, Ca.

## Specialisto pri la okuloj kaj la spina nervo

Okulvitroj por ĉiuj kuritaj al la okuloj.

D-RO ANTONIO ROMITO

110 Liberty Ave., Room 602. - PITTSBURG, PA.

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at  
West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

*Published Monthly by*

**THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)**

**West Newton, Mass.**

**ONE DOLLAR A YEAR**

**Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)**

**SINGLE COPY TEN CENTS.**

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj estas ĉiam prefere akceptitaj. *Oni ne resendas* neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone. Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

---

---

**Vol. 14**

**OCTOBER, 1913**

**No. 3**

---

---

### EL LA REDAKCIA SANKTEJO

Ni kore dankas la samideanojn pro ilia subtenado rilate al ĉi tiu propaganda numero. Bone, vi scias ke ni ankoraŭ estas nur novbakitaj pri niaj laboroj, kaj kredeble ni faris (kaj eble *faros*) multajn ridindajn erarojn sed—estas nenio. Oni ne povas halti nin! Ni kreskas konstante, kaj baldaŭ, kun *via* konstanta helpo, ni envicigos Usonon *unua* en la Esperanta movado—al la sama altgrado kiun ĝi nun okupas pri aliaj mond-aferoj.

*Puŝegu, ĉiu*, kaj ni atingos la celon!

Gratulojn al niaj "Manchester" amikoj pri la sukceso de la N. E. E. A. jarkunveno. AMERIKA ESPERANTISTO ĝuis la tempon de sia vivo.

Ni havas plezuron doni al niaj legantoj la sekvantan vivoplenan rakonton pri la bela Berna Kongreso, kiu estis unu el la plej sukcesaj kaj ĝojigaj kongresoj ĝis nun okazintaj. Tiuj, kiuj ne povis vojaĝi Bernon preskaŭ kredos, ke ili tamen ĉeestis post legado de tiu ĉi raporto. S-ro Privat ne volis akcepti mem redakti la raporton, ĉar li estis tro okupata dum la kongreso. Ni devas danki lin, ke li sciis trovi por ni tiel lertajn korespondantojn, kiuj nun kvazaŭ kinematografe vivigos antaŭ vi la tutan semajnon en Berno. Aĉetu multope ĉi tiun numeron de nia gazeto por ĝin disdoni al viaj amikoj kaj ĝuigi al ili la saman plezuron kiun vi ricevos el tiu legado.

LA NAŬA INTERNACIA KONGRESO  
THE NINTH INTERNATIONAL CONGRESS  
BERNO 24-32 AŬGUSTO 1913  
BERN, 24-31 AUGUST, 1913



LA KONGRESEJO

**LA ALVENO.**

**Ce la akceptejo.**

Jam ĉe la stacidomo la esperantistoj saltinte el sia vagonaro trovas afablajn akceptantojn kun verda rubando kaj tiel pli facile ricevas tuj gvidon al sia loĝejo. Elfrante el la stacidomo sur la placon ili unue pasas sub luksa kaj arta esperantista triumfarko kun devizo "Koran Bonvenon" kaj poste rapidas al sia hotelo marŝante sub la pentrindaj arkajoj kiuj kovras en Berno ĉiujn trotuarojn de la ĉefaj stratoj.

Post laveto kaj manĝeto ĉiuj ekuras al la Akceptejo en la Kongreseja Palaco—la urba kazino, kiun ornamas niaj flagoj kaj grandaj esperantaj surskribaĵoj sur verda ŝtofo. Orde aranĝita kiel bankoficejo la akceptejo ŝajnas tuj tre severa. Deko da junaj agemaj gesinjoroj respondas informojn, disdonas kovertojn, vendas biletojn al la amaso da novalvenintoj kiuj premiĝas antaŭ la diversaj fakoj de la oficejo. Gajaj Francoj, altkreskaj Germanoj kaj Svedoj, salutemaj Hispanoj kaj Italoj reciproke

**THE ARRIVAL—AT THE**

**"AKCEPTEJO."**

At the depot, the esperantists having already alighted from their railroad carriages find affable guides wearing a green ribbon to receive them and so most easily receive immediate guidance to their destination. Going from the depot to the square they first pass under a sumptuous and artistic Esperanto triumphal arch with the device "Koran Bonvenon" (A Cordial Welcome) and afterwards hurrying to their hotel walking under the hanging arches which in Bern cover every sidewalk of the principal streets.

After a hasty toilet and a light meal all run out to the reception bureau in the "Congressional Palace" the city Casino, which is decorated by our flags and large Esperanto inscriptions on green materials. Arranged as orderly as a bank, the "Akceptejo" seems at first very severe in its appearance. The active young workers—men and women—are responding to questions, distributing envelopes, selling tickets to the crowd of new arrivals who are pressed together before the different divisions of the office. Gay Frenchmen, tall Germans and Swedes, bowing Spaniards and Italians all ex-

manpremas kaj interparolas kvazaŭ ĉiuj jam konus unu la alian de sia naskiĝo.

Kaj nur unu lingvo sonas ĉiam kaj ĉie. Tiu belsona, ritmoplena Esperanto, kiun eksemis en la mondo antaŭ dudek ses jaroj plej modesta geniulo.

"Ĉu la Majstro jam alvenis?"

"Jes, mi aŭdis ke li ĵus venis el Wiesbaden."

"Ĉu vi scias la teruran novaĵon?"

"Pri la morto de Carlo Bourlet? Jes. Kia bato! Li, tiel forta kaj talenta."

"Kaj Abato Richardson?"

"Kion? Ĉu ankaŭ li . . . ?"

"Jes, li ankaŭ . . . ĵus antaŭ la kongreso."

"Ho ve! Li estis tiel bonkora kaj amata!"

"Nu, jen Kolonelo Pollen! Bonan tagon, kara kolonelo, kiel vi?"

"Ĉu vi jam vizitis la ekspozicion?"

### La Ekspozicio.

Sur la unua etaĝo de l'palaco oni zumas ankoraŭ pli laŭte ol en la Akceptejo. Tie ne superstaras severa kaj iom vana surskribaĵo "Tie ĉi ne estas bablejo".

Kiaj amasoj da esperantaj libroj! Ĉu vere ni havas tiel vastan literaturon? Ĉiu sentas sin hontanta, ke li ne legis pli multajn el tiom da verkoj. Jen esperantistaj ventumiloj, poŝtukoj, juveloj, k. t. p. Nu! kian moneron vi proponas al mi, tio ja ne estas svisa franko!

"Ne Sinjoro, ĝi estas spesmilo!"

"Ne ŝercu, mi petas . . ."

"Rigardu sinjoro, estas ja vera spesmilo el bona, bela argento. S-ro de Saussure ĵus eldonigis por la Kongreso du mil aŭtentikajn spesmilojn kun la kapo de D-ro Zamenhof kaj esperanta ŝildo kun Sm.1".

"Nu, tio estas certe multe pli bona ol ĉiuj liaj 'lingvoj kosmopolitaj' kaj 'Antidoj'".

"Li ĵus disdonigis gravan artikolon por pruvi ke oni nek devas, nek povas reformi Esperanton nun vivantan lingvon."

"Nu mi ĝojas kaj bondeziras, ke li haltu sur tiu ĉi saĝa konkludo".

changing hand-shakes and talking among themselves as though all had already known each other since birth. And only one language sounds always and everywhere, that beautiful sounding, rhythmic Esperanto, which a most modest genius sowed in the world twenty-six years before.

"Has the Master yet arrived?"

"Yes, I heard that he had just come from Weisbaden."

"Do you know the terrible news?"

"About the death of Carlo Bourlet? Yes, what a blow! He—so strong and talented."

"And Abbott Richardson?"

"What? And he also . . . . .?"

"Yes, he also—just before the Congress."

"Alas! He was so good-hearted and beloved!"

"Well! Here is Col. Pollen! Good day, dear Colonel. how are you?"

"Have you yet visited the exposition?"

### The Exposition.

On the first floor of the palace they buzz still more loudly than in the "Akceptejo." There, is not towering above a severe and somewhat vain inscription: "This is not a chattering place."

What a pile of Esperanto books! Is it true we have such a vast literature! Each feels ashamed of himself that he has not read more of so many works. Here are Esperanto fans, pocket handkerchiefs, jewelry, etc. Well! What kind of money are you offering to me, indeed that is not a Swiss franc!

"No sir, it is a 'spesmilo.'"

"Do not joke, I beg —"

"Look at it, sir, it is truly a 'spesmilo' made out of good beautiful silver. M. de Saussure has just caused two thousand authentic 'Spesmiloj' to be issued for the Congress containing the head of Dr. Zamenhof and an Esperanto shield with 'Sm. 1' (50c)."

"Well, that is certainly a great deal better than all his 'Cosmopolitan Languages' and 'Antidoj.'"

"He just has had distributed an important article in order to prove that one not only must not, but can not reform Esperanto now a living language."

"Well I am glad and offer my best desires that he stop at that wise conclusion."

Kial ĉiuj laŭte ridegas ĉe tiu angulo? Nu, venu por vidi kio okazas? Estas la vendejo de karikaturaj postkartoĵoj. Ho, jen la bildo de Kolonelo Pollen, kiel hinda Reĝo! Nu, jen Hodler tenanta la telegrafajn fadeĵojn de U. E. A. al ĉiuj urboj de la mondo. Jen forta berna urso, nia kara ĉeforganizanto de l'kongreso Schmid. Jen Napoleono Rosenstock. Jen Privat, kiel juna knabo, paŝante trans Atlantiko por disĵeti propagandilojn. Li havas poetan liron pendantan ĉe la kolo.

Nu ankoraŭ novaj libroj! Oni diras ke aperis naŭcent novaj libroj en Esperanto dum la lasta jaro.

Ni rapidu foriri, ĉar ni ja ricevis invitkarton de la prezidanto de l' Svisa Esperantista Societo por lia "At home" hodiaŭ vespere.

#### Ce S-ro Stettler, la Prezidanto de la Svisa Esperanta Societo.

En hejmaj salonoj de tipa malnova familio de Bernaj aristokratoj jam amasiĝis ĉiulandaj eminentuloj. S-ro Stettler gastame akceptas ĉiujn en plej afabla kaj svisa demokrata maniero. Jen la Usonaj ŝtataj delegitoj—S-ro Dutton por Massachusetts, kaj S-ro Harris por Maine. Ili parolas amike kun S-ro Perogordo, speciala sendito de la Hispana Reĝo Alfonso XIII. Jen S-ro Universitates-tro Boirac, prezidanto de nia Lingva Komitato, kun la germana akademiano D-ro Mybs. Jen nia fama reĝino de poezio S-ino Marie Hankel kun ambaŭ la verkintoj de l'kongresaj teatraĵoj, S-ino Wolf, aŭtorino de "Patreco" kaj S-ro Privat, aŭtoro de "Ginevra". Jen grupo da svisaj propagandistoj: afablaj junulinoj rondpasigas teon, kafon, glaciaĵojn kaj eĉ kuragaŝ trapasi la fumejon de l'sinjoroj kaj penetri ĝis apuda ĉambro, kie sonas serioza diskutado. Jen Generalo Sebert, S-ro Chavet kaj S-ro Hodler, kiuj forlasis la frivolecon de l'salono por prilabori programajn aferojn de l' kongreso.

Why were all loudly laughing at that corner?

Well, come and see what is happening.

It is the selling of post card caricatures. Oh, here is the picture of Col. Pollen, as a Hindu king! Well, here is Hodler, holding the telegraph wires of U. E. A. to all cities of the world. Here a strong Bern bear, our dear, chief organizer of the Congress, Schmid. Here Napoleono Rosenstock. Here Privat, as a young boy, passing across the Atlantic to scatter the propaganda in all directions. He has a poet's lyre hanging from his neck.

Well and still new books! It is said that there have appeared nine hundred new books in Esperanto during the past year.

We must hurry to go, because indeed we have received invitation cards from the president of the Swiss Esperantist Society for his "at home" this evening.

#### At M. Stettler's—The President of the Swiss Esperanto Society.

In the home parlors of a typical old world family of Bern aristocrats, were already gathered eminent persons from every land. M. Stettler hospitably greets everybody in the most affable and democratic manner of the Swiss. Here are the delegates from the United States: Rev. Horace Dutton for Massachusetts and Mr. Herbert Harris for Maine. They talk in a friendly way with Capt. Perogordo, special ambassador from the Spanish King, Alphonse XIII. Here is the University Rector, M. Boirac, president of our "Lingva Komitato" (Language Committee), with the German academician, Dr. Mybs. Here is our famous queen of poetry, Mme. Marie Hankel, with the two writers of the congress plays—Mme Wolf, author of "Patreco", and M. Privat, author of "Ginevra."

Here is a group of Swiss propagandists: charming young ladies pass around tea, coffee, ices, and even have courage to pass through the smoking-room of the gentlemen and penetrate as far as an adjoining room where a serious discussion is taking place. There is General Sebert, M. Chavet and M. Hodler who have left the frivolity of the salon in order to work out the program affairs of the Congress.

**La Dimanĉo; la Diservoj; La Solena Malfermo.**

Dimanĉon matene multaj sukcesis frue leviĝi por ĉeesti la diservojn. Ne nur naciajn barilojn Esperanto dolĉigas sed ankaŭ eĉ religiajn, laŭ intenco de Zamenhof. Li kaj Abdul-Baha povus ĝoĝi vidante la amason de ĉiakredaj kongresanoj, kiuj kuris de la Sinagogo al la Templo, de la Templo al la Preĝejo kaj plenigis ilin ĉeestante la hebrean, la protestantan kaj la katolikan diservojn je la 9a, 10a kaj 11a. Plej multaj ĉeestis ĉiujn tri unu post la alia. Jen bela ekzemplo de reciproka toleremo kaj simpatio!

Je la 3a posttagmeze jam estas tute plena la vasta ĉambrego de l' kazina palaco, lukse ornamita per steloj el naturaj floroj. Sidas tie la 1100 kongresanoj kaj sur la balkonoj eble kvin aŭ ses cent Bernaj neesperantistoj. La vidaĵo estas mirinde impresiva kiam envenas sur la estradon D-ro Zamenhof kun la komitato de l' kongreso. La tuta ĉeestantaro entuziasme levigas kaj ekkantas la Esperon. Poste ankoraŭ longe sonas entuziasma akklamado kaj fine ekstaras la prezidanto de K. K. K. (Konstanta Kongresa Komitato) Generalo Sebert, kiu malfermas la kunsidon anstataŭ D-ro Mikolajski forestanta.

Oni aklande elektas la jenan kongresan estraron:

Prezidanto: S-ro J. Schmid; Viceprezidantoj: S-roj de Saussure kaj Ed. Stettler; ĝenerala sekretario: S-ro G. Chavet. Plie, naciaj vicprezidantoj estas: Kol. Robinson (Britujo) S-ro Rollet de l' Isle (Francujo), D-ro Arnholt (Germanujo).

Tiam ekparolas la honora prezidanto de l' kongreso: Kolonelo Emil Frey, eks-prezidanto de Svisa Respubliko. Lia eminenteco kaj ankaŭ lia hela, nobla vizaĝo kun blankaj haroj kaj barbo forte impresas la kongresanojn. Lian paroladon germanan poste tradukas esperanten F'ino. Haberti.

Poste salutas la kongreson la ŝtatestro de Bern, S-ro Kistler, per mallonga kaj elokventa parolado.

**Sunday—The Church Services; The Formal Opening.**

Sunday morning many succeeded in rising early to attend the church services. Esperanto softens not only national barriers, but also even religious, following the intention of Zamenhof. He and Abdul-Baha would rejoice on seeing the crowd of Congress members of all beliefs, who ran from the Synagogue to the Temple, from the Temple to the Church and filled them, attending the Hebrew, the Protestant and the Catholic services at 9, 10 and 11 o'clock. Most of them attended all three, one after the other. Here was a beautiful example of reciprocal tolerance and sympathy.


At 3 o'clock in the afternoon, the vast hall of the Casino palace, richly ornamented by stars made of natural flowers, was already entirely filled. Seated there are the 1100 Congress members and in the balconies possibly five or six hundred non-esperantists from Bern. The sight is wonderfully impressive when Dr. Zamenhof comes on the platform with the committee of the Congress. The entire audience rises in enthusiasm and sings "La Espero." Afterwards, for a long period, still sound enthusiastic acclamations and finally the President of the "Konstanta Kongresa Komitato" (Constant Congress Committee) General Sebert, steps out and opens the meeting in place of the absent Dr. Mikolajski.

By acclamation the following congressional executive body is elected:

President, J. Schmid; Vice-Presidents, R. de Saussure and Ed Stettler; General Secretary, J. Chavet; National Vice-Presidents are Col. Pollen (Britain) Rollet de l' Isle (France), Dr. Arnholt (Germany).

Then Col. Emil Frey the honorable president of the Congress, ex-president of the Swiss republic speaks. His distinguished position and also his fine noble face, and white hair and beard strongly impress the Congress members. His speech in German was afterwards translated into Esperanto by Miss Haberti.

After this, greetings to the Congress are extended by the Mayor of Bern, Mr. Kistler in a short and eloquent speech.



SUR LA ESTRADO DUM MALFERMA KUNVENO

Jen eksonas la granda orgeno sub talentaj fingroj de famkonata muzikverkisto Karl Locher, kiu ludas belegan improvizon sur temo de la "Espero". Tiu potenca kaj sentoplena muzikaĵo entuziasmigas la aŭdantaron.

S-ro Rektoro Boirac, prezidanto de la Esperantista Akademio, devas plenumi sanktan kaj malgojigan devon, li elvokas la memoron de l' mortintaj kunbatalantoj, P-ro Dor, la amiko de l' malriĉuloj en Lyon, kiu estis antaŭ tri dek jaroj rektoro prezide de la Bern'a Universitato, mondfama okulisto, nin forlasis preskaŭ tuj post la Krakow'a Kongreso, kiun li ne povis ĉeesti malgraŭ lia deziro ĉiam helpi T. E. K. A. Sed ŝajnas, ke la morto prokrastis ĝis lasta momento siajn frapojn por fari ilin pli kruele.

Carlo Bourlet estis varbita al Esperanto en 1900 de P-ro Ch. Meray de la Dijon'a Universitato, kaj de tiam ne estas eble kalkuli liajn servojn al nia afero.

La lasta, kiun kovris tero antaŭ tri tagoj, estas Abato Richardson, kiu estis sin tute doninta al la Esperanta movado inter katolikoj kaj kiu preparis la baldaŭan kongreson

Here sounds the great organ under the talented fingers of the well known musical artist, Karl Locher who plays a most beautiful composition improvised by himself from a theme of "La Espero."

That dominating piece of music, so full of feeling, filled the audience with enthusiasm.

Rector Boirac, President of the Esperanto Academy was impelled to perform a sacred and sad duty, in calling to memory the workers who had just died: Dr. Dor, the friend of the poor in Lyon, who three years before was the rector of the Bern University, a world-famous oculist, passed away almost immediately after the Cracow Congress, which he was not able to attend in spite of his desire always to help "T. E. K. A." (World Association of Esperantist Physicians); Ladeveze, that Frenchman from Marseilles who played such an important role for the propaganda in Germany and principally in Hamburg where he lived; if he has departed nevertheless his excellent work "Demandaro" remains; Carlo Bourlet was recruited to Esperanto in 1900 by Rev. Ch. Meray of the Dijon University, and since then it is impossible to calculate his services to our movement. We have lost a most energetic propagandist, who among others succeeded in making favorable to our movement the powerful Touring Club of France and the



en Rome; dank'al li, malgraŭ lia malĝojiga foresto, tiu kongreso sukcesos post kelkaj tagoj.

S-ro Schmid proponas, ke la ĉeestantaro solene levigu por funebre honorl tiujn mortintojn; emocio tiam regas en ĉiuj koroj.

Per kelkaj vortoj salutas la kongreson la oficialaj Delegitoj de Regno, publikaj Administracioj kaj Internaciaj Asocioj:

Aŭstrio—Iniciata Sindikato de Bohemia Ĝenerala Konsulo en Bern. Komerca ĉambro de Reichenberg: Wilhelm Heller.

Costa-Rica—La Regno: Locher, Ĝenerala Konsulo en Bern.

Germanujo—Politeknika Supera Lernejo en Coethen: Rektoro D-ro Foehr.

Hispanujo—La reĝo de Hispanujo komisiis Kapitanon Perogordo por ĉeesti la Kongreson; Ministro de Progreso, ĝenerala direkto de komerco, industrio kaj laboro: D-ro Rafael de San Millan; Hispana Ruga Kruco: Kapitano Perogordo; Centro aŭtonomia de komerco kaj industrio de Barcelono: Anglada.

Svisujo—Statkonsilantaro de la Kantono de Bern: S-ro Emil Lohner, direktoro de la publika instruado de la kantono; Burĝestraro de Bern: S-ro von Buren-von Salis.

Usono—Stato Massachusetts: Pastro Horace Dutton; Stato Maine: Herbert Harris.

Asocioj—Tutmonda Unio por Kristana Celado: Pastro Horace Dutton; Internacia Ordeno de la Bontemplanoj: Tamke; Internacia Asocio por la fondo de Mondlingva Oficejo: Rollier, vic-prezidanto; Kristanaj Junularaj Asocioj: Em. Sautter; Internacia Oficejo de la Eldonistoj: Alfred Melly.

S-ro Rene de Saussure faras poste longan kaj interesan paroladon kaj klarigas ke, pro decido de D-ro Zamenhof forlasi ĉiun oficialan rolon en la kongreso, oni anstataŭos (en estontaj jaroj) lian kutiman paroladon per parolado de la prezidanto de l' kongreso. S-ro de Saussure esprimas al nia Majstro la unuaniman dankon de la Esperantistoj, ke li al-

publishing firm of Hachette & Co. The last whom earth covered three days before is Abbott Richardson who gave himself entirely to the Esperanto Movement among Catholics and who prepared the Catholic Congress soon to take place in Rome; thanks to him, notwithstanding his sad loss, that Congress will be successful.

M. Schmid proposes that the audience solemnly rise in sadness to honor those dead; emotion reigns in all hearts.

In a few words the official delegates of rulers, public administrations and International Associations greet the Congress:

Austria—Initiative Syndicate of Bohemia in Prague: M. Pitlik; Commercial Chamber of Reichenberg: Wilhelm Heller.

Costa Rica—The State: M. Locher, general Consul in Bern.

Germany—Polytechnic High School in Coethen: Rector Dr. Foehr.

Spain—The King of Spain commissioned Captain Perogordo to attend the Congress; Minister of Progress, general director of Commerce, Industry and Labor: Dr. Rafael de San Millan; Spanish Red Cross: Capt. Perogordo; Central Autonomy of Commerce and Industry of Barcelona: Anglada.

Switzerland—State Councilor of the Canton of Bern: Emil Lohner, director of Public Instruction of the canton; Bern House of Burgesses: M. Von Buren—M. Von Salis.

U. S. A.—Massachusetts: Rev. Horace Dutton; Maine: Herbert Harris.

Associations—Christian Endeavor World Union: Rev. Horace Dutton; International Order of Good Templars: M. Tamke; International Association for the Founding of a World Language Office: M. Rollier, Vice-President; Christian Young People's Association: Em. Sautter; International Office of Publishers: Alfred Melly.

Afterwards Rene de Saussure makes a long and interesting speech and explains that by reason of the decision of Dr. Zamenhof to vacate every official role in the Congress, in future years his customary speech will be replaced by a speech from the president of the Congress. M. de Saussure expresses to our "Majstro"



T. SCHMID—PREZIDANTO

menaŭ bonvolas daŭrigi sian ĉeston en niaj kongresoj kaj tiel doni al ĉiuj la plej grandan gojon de la tuta kongreso; t. e. renkontiĝi kun li. Poste S-ro de Saussure klarigas siajn personajn ideojn pri tutmonda organizado kaj proponas ke oni havu tri oficialajn fakojn: 1e, Lingva Komitato por lingvaj aferoj; 2e, Internacia Asocio por propagando kaj 3e, U. E. A. por aplikado de la lingvo. La kongresoj estu komunaj festoj, ĉe kiuj ankaŭ okazu laborkunsidoj de la tri fakoj. Poste sekvas longa serio de unuminutaj paroladetoj de Esperantistoj:

Naĉaj Deleĝitoj:

Aŭstrio-Hungarujo — Germana lingvo: D-ro Albert Engler; Itala lingvo: D-ro Ghez; Hungarujo: S-ro Vaniĉek.

Belgujo—F-ino Maria Posenaer.

Bulgarujo—Ivan Krestanov.

Britujo—Kolonelo J. Pollen; Skotlando: W. Ross; Irlando: D-ro Jameson Johnston; Kimrujo: Jack Edwards.

Danujo—J. Lunbach.

Finnlando—K. von Frenckell.

Franĉujo—Profesoro Raoul Briard; Sergeant.

Germanujo — Profesoro Leder-

the unanimous thanks of the esperantists that he is at least pleased to continue his attendance at our congresses and so gives to all the greatest joy of the entire congress, that is, to become acquainted with him.

Then M. de Saussure explains his personal ideas about whole-world organization and proposes that they should have three official departments—1. Language Committee for Language affairs, 2. International Association for propaganda, and 3. Universal Esperanto Association for application of the language. The Congresses should be mutual festivals at which also would take place executive sessions of the three departments.

Subsequently follows a long series of one-minute talks by Esperantist national delegates:

Austria-Hungary — German language: Dr. Albert Engler; Italian: Dr. Ghez; Hungarian: M. Vaniĉek.

Belgium—Miss Maria Posenaer.

Bulgaria—Ivan Krestanov.

Britain—Col. J. Pollen; Scotland: W. Ross; Ireland: Dr. J. Johnston; Wales: Jack Edwards.

Denmark—J. Lunbach.

Finnland—K. von Frenckell.

mann; D-ro Mybs.

Gibraltar—Kolonelo Pollen.

Hispanujo—Kapitano Perogordo;  
D-ro de San Millan; Kataluna lingvo: Alfonso Sabadell.

Italujo—Pier Carlo Monti, Attilio Voana.

Nederlando—Vermaas.

Portugalujo—Rodolfo Horner.

Rusujo—D-ro Andreo Fiŝer, S. Obručev.

Svedujo—Teodor Rosengren.

Aŭstralio—F-ino Sinotte.

Oceanio—Malajaj ŝtatoj: Ariffin.

Nun Generalo Sebert anoncas solenan manifestacion kaj la prezidanto de l' kongreso S-ro Schmid, akompanata de du Bernaninoj en svisaj kostumoj prezentas al D-ro Zamenhof oran medalon por rememorigi la jubileon de Esperanto kaj la eniron en novan periodon de la movado. Dum oni aplaudas unu el la svisaj fraŭlinoj prezentas belan bukedon al S-ino Zamenhof, kiu dum tuta lia vivo kuragiĝis kaj helpis sian ĝenan edzon.

Nun rezonas la orgeno: la kunkveno finiĝis.

### La Marŝado tra la Urbo. La Lumigo de l' Katedralo.

Elirinte el la kazino la kongresanoj ordiĝas kvarope kiel soldatoj laŭvice apud siaj 27 naciaj flagoj, kiuj fiere kaj amike flirtadas sur la strato post la verda standardo. Gvidate de la urba muzikistaro la longa sekvantaro marŝadas tra la urbo inter scivolemaj amasoj da Bernanoj. Alveninte antaŭ la Nacian Palacon de l' Svisa Registaro, la kongresanoj haltas kaj forpreninte la ĉapelojn, kantas esperante la Svisan Himnon. Tio forte impresas la dekmilion da personoj, kiuj tutplenigis la placon por vidi. De tie la sekvantaro remarŝas al la kazino kaj tie sur la placo, antaŭ la balkono kie staras D-ro Zamenhof, ĉiuj lin ovacie akklamas kaj fine fiere kantas "La Espero". Por la ĵurnalistoj kiuj sukcesis supreniri kaj kaŝiĝi inter la kolonoj de la balkono neforgesebla estas tiu vidaĵo de esperantista amaso kun ĉiaj naciaj flagoj. Tie jam la militista ordo malaperis kaj fondiĝis en senforma vera homamaso. Prave

France—Prof. R. Bricard.

Germany—Prof. Ledermann, Dr. Mybs.

Gibraltar—Col. Pollen.

Spain—Capt. Perogordo; Dr. de San Millan; Catalonia: Alfonso Sabadell.

Italy—Carlo Monti; Attilio Voana.

Netherlands—M. Vermaas.

Portugal—R. Horner.

Russia—Dr: Fiŝer; S. Obručev.

Sweden—Teodor Rosengren.

Australia—Miss Sinotte.

Oceania—Malay states: M. Ariffin.

Now General Sebert announces a formal ceremony, and the president of the Congress, M. Schmid, accompanied by two ladies of Bern in Swiss costumes, presents to Dr. Zamenhof a gold medal in remembrance of the jubilee of Esperanto and the entrance of the movement into a new period. During the applause, one of the Swiss girls presents a beautiful bouquet to Mrs. Zamenhof, who has encouraged and helped her genius husband during his entire life.

Now again sounds the organ; the meeting is finished.

### The March Through the City. The Illumination of the Cathedral.

Having left the Casino, the Congress members form in order, by fours like soldiers, in line near their 27 national flags, which proudly and amicably flutter on the street behind the green standard.

Led by the city band, the long procession marches through the city between inquisitive crowds of Bernese. Having arrived before the national Palace of the Swiss Government, the Congress members halt and taking off their hats, sing in Esperanto the Swiss Hymn. That strongly impresses the ten thousand persons who had filled the place in order to see. From there the procession marches back to the Casino and there, on the square, before the balcony where Dr. Zamenhof is standing, all, by ovation salute him and finally in chorus sing "La Espero." For the journalists who had succeeded in going above and hiding among the columns of the balcony that view of an Esperanto gathering with national flags of every kind is unforgettable. Already the military order had disappeared and a formless, truly human crowd had become

diris S-ino Zamenhof, dum ŝi kaj la edzo preskaŭ ekploris pro kortuŝo "Nu, kiu nun rifuzas kredi ke ekzistas popolo esperantista."

Fine saĝa Generalo Sebert devis forkonduki la Majstron de la balkono dirante al li "Se vi ne foriros ili nepre restos tie ĝis morgaŭ kaj eĉ pli longe."

Kiam la Esperantistoj vespere revenis al siaj hoteloj jen ekbrilis sur la nokta ĉielo la bela gotika turo de l' katedrala preĝejo, speciale lumigita por honori la kongreson.

established. Mrs. Zamenhof, while she and her husband were so affected they almost wept, rightly remarked:

"Well, who would now refuse to believe that there exists an Esperanto people."

Finally, wise General Sebert was obliged to conduct the "Majstro" away from the balcony saying to him: "If you do not go away they assuredly will remain there until tomorrow and even longer!"

When the Esperantists in the evening came back to their hotels here was shining out against the night heavens the beautiful Gothic tower of the Cathedral Church, specially illuminated in honor of the Congress.



GRUPO DE ESPERANTISTOJ EL ELZACO-LOTRINGO EN NACIAJ KOSTUMOJ

#### Solena Malfermo de la U. E. A. kongreso

Post mateno pasigita ĉe diversaj naciaj kaj fakaj kunvenoj, la amaso de l' kongresanoj premiĝis je la tria posttagmezo en la salonego de la urba konsilantaro por ĉeesti la festan kunvenon de U. E. A. Opera orkestro aŭdigis trilan muzikon de Mozarto Overturo dum centoj da malfeliĉuloj vagadis vane serĉante seĝojn tra la koridoroj ĉirkaŭ la multe tro malgranda kaj superplena ĉambrego.

Pro foresto de la U. E. A. prezidanto S-ro Mudie, Prof. Rousseau vicprezidanto prezidas tiun kongres-

#### FORMAL OPENING OF THE U. E. A. CONGRESS.

After a morning passed at different national and sectional meetings, the throng of congress members, at three o'clock in the afternoon, crowded into the great salon of the city council to attend the festival-meeting of U. E. A. An operatic orchestra sounded the beautiful music of a Mozart overture while hundreds of unhappy beings wandered around through the corridors surrounding the too small and over-crowded great room, vainly seeking chairs.

On account of the absence of the U. E. A. President Mr. Mudie, Prof. Rousseau, vice-president, presides at

on. Li ĝin malfermas per rimarkinda parolado. Unue li ankaŭ honore aludas al niaj bedaŭrataj mortintoj. "Ilia ekzemplo kaj ankoraŭ vivanta spirito nin helpu por mem pli vigle labori." Fine Prof. Rousseau esprimas la unuaniman senton de la kongreso dankante S-ron Hodler pro lia talenta senlaca kaj senpaga direktado de la Ĝeneva oficejo.

Kolonelo Pollen legas paroladan leteron de S-ro Mudie, kiu konstatas ke la servoj de U. E. A. preskaŭ duobligis. Li ankaŭ dankas al S-ro Hodler kaj lia terta kolego S-ro Stettler, kiu tiel sukcese pli fortigis U. E. A. per kreo de la garantia kapitalo. La kongreso decidis sendi al S-ro Mudie salutan kaj dankan leteron.

Jen S-ro Hodler faras sian ĉiujaran raporton; "Kiel staras U. E. A." Malgraŭ la duobligo de la kotizaĵo, U. E. A. nun havas 6000 anojn. Li petas ke oni ne danku lin sed la modestajn delegitojn, kiuj pacience laboradis ĉiu en sia loko por plenumi sian ĉiutagan devon.

S-ro Hodler bazinte sian diron sur la sperto insistas precipe pri la neceso de la individua varbado, kiu ĉiam liveris kaj liveros pli gravajn rezultatojn ol la ĝenerala tro universala propagando.

Post orkestra ludo de bela muzikajo "Largo" de Haendel, ekstaras nia ŝatata oratoro, S-ro Edmond Privat por fari kiel kutime sian festan paroladon. La anoncita titolo estis tiun ĉi jaron: "La nuna tasko de Esperantismo". Li flanko lasas la raportojn kaj ciferojn por ĉerpi el ili ĝeneralan instruon. Per bela kaj entuziasmiga stilo, li sin turnas al la popolo esperantista. "Multe ni lernis en nia longa jam multejara penado por Esperanto. Ni travivis ĉiujn sezonojn kun ilia propra karaktero. Sage ni kreis en Esperantujo tiun karan domon U. E. A., kie ni povas sengene labori ne nur por Esperanto, sed por realigi la internan ideon de Esperantismo. Dum en nia oficiala propaganda movado, ni estas iom malvarme neŭtralaj, en U. E. A. ni povas kurage utiligi nian karan lingvon por noblaj kaj pro-

this congress. He opens it by a remarkable speech. First he also, in honor, alludes to our unfortunate dead: "Their example and still living spirit should help us to work more vigilantly." Finally, he expressed the unanimous feeling of the congress in thanking Mr. Hodler for his talented, untiring and unpaid direction of the Geneva office.

Col. Pollen reads a speech from Mr. Mudie received by letter which certifies that the services of U. E. A. have almost been doubled. He also thanks Mr. Hodler and his clever colleague, Mr. Stettler, who have so successfully strengthened U. E. A. by creating the guaranty capital. The congress decides to send to Mr. Mudie a letter of greeting and thanks.

Then Mr. Hodler makes his yearly report: "How U. E. A. Stands." In spite of the doubling of the membership fee, U. E. A. now has 6000 members. He requests that they should not thank him, but the modest delegates, who are patiently working each in his place to fulfil his daily duty.

Mr. Hodler, basing his remark on practical knowledge, insists principally about the necessity of individual effort, which has always supplied and will always supply more important results than the general, too universal, propaganda.

After an orchestral concert of the beautiful composition "Largo" (Haendel) comes forward our esteemed orator, Edmond Privat, to make, according to custom, his "fete" speech. The title announced for this year is "The present task of Esperantism." He passes by the reports and figures to extract from them general instruction. In beautiful and enthusiastic style, he turns himself to the "Esperanto people."

"In our long-continued efforts for Esperanto, during many years, we have learned much. We have lived through all seasons with their own individual character. Wisely we have created in Esperanto-land that dear house, U. E. A. where we are able without inconvenience to work not only for Esperanto, but in order to make real the internal idea of Esperantism. While in our official propaganda movement we are somewhat coldly neutral, in U. E. A. we are able courageously to utilize our dear language for noble and pro-

gresemaj homaraj celoj. Ju pli ni alportas per Esperanto helpon, konsolon, amon al la aliaj homoj, des pli nia lingvo fariĝas amata kaj inda je ĉies fervoro." S-ro Privat montras konklude ke nia devo estas servi Esperanton al sukceso de ĉiuj noblaj internaciaj movadoj de la nuna tempo. Kun granda entuziasmo la aŭdantaro levigas por akلامي la oratoron kaj postulas presigon de lia neforgesebla parolado.

La kunveno finiĝis.

#### La Festvespero sur la Monteto Schaezli.

La bernaj tramvojoj dum la tuta vespero transportadis plenajn vagonojn da Esperantistoj ĝis la "Innere Enge". Vasta koncertgardeno kun centoj da restoraciaj tabloj, estis ornamita per ĉiukoloraj paperaj lanternoj, multaj kun esperanta stelo. Dum gaje ludadis aŭ ripoze silentis la muziko, la gekongresanoj senfine babiladis, trinkante bieron aŭ teon laŭ diversnacaj gustoj. De tablo al tablo okazis ĝojgaj renkontigoj, prezentiĝoj, rekonigiĝoj kaj ĉiuj eblaj "iĝoj" en amika senco. Oni rimarkis rondan dancadon de Elzaciaj gesamideanoj en naciaj kostumoj.

Ĉie nur Esperanto sonis, sola komuna lingvo inter tiuj tre diverslandaj homoj. De tempo al tempo la orkestro ludis la "Esperon" kaj ĉiufoje oni levigis kaj kunkantis nian himnon. La ĉeestintoj neniam forgesos tiun poezian vesperon de plej agrabla interfratiĝo. Tiaj festoj estas la plej belaj momentoj, eble la plej utilaj en niaj kongresoj.

#### La Teatra Vespere.

Mardon vespere la kongresanoj kaj ankaŭ kelkcentoj da bernaj scivolemuloj plenigis la Bernan Varietan Teatron por ĉeesti la anoncitan du prezentojn de "Patreco" kaj "Ginevra". Opera orkestro ludis uverturon antaŭ la unua dramo kaj diversajn pecojn de Mozart, Boccherini kaj Haendel antaŭ ĉiu akto de la dua dramo. La prezentado komencis nur malfrue por atendi la kongres-

gressive philanthropic aims. The more we carry assistance, comfort, love, to other men, by means of Esperanto the more our language is made beloved and worthy of everyone's ardor."

Mr. Privat points out in conclusion that our duty is to make Esperanto work for the success of all noble international movements of the present time. With great enthusiasm the audience rises to applaud the orator and ask for a printing of his memorable speech.

This meeting was finished.

#### The Festal Evening on "Schaezli" Hill.

The Bern railways during the entire evening transported crowded cars of Esperantists to the "Innere Enge." A vast concert garden with hundreds of restaurant-tables, was ornamented by paper lanterns of every color, many with an Esperanto star. While the music gayly played or for a rest became silent, the congress members unceasingly chattered, drinking beer or tea according to the taste of different nationalities. From table to table occurred glad meetings, introductions, recognitions and all possible "iĝoj" in a friendly sense. A round dance by Alsace-Lorraine fellow-thinkers of both sexes, in national costumes, was noteworthy.

Everywhere only Esperanto sounded, one common language among those men from such diverse lands. From time to time the orchestra played the "Espero" and each time all arose and sang together our hymn. Those present will never forget that poetic evening of most agreeable fraternity. Such festivals are the most beautiful moments and possibly the most useful in our congresses.

#### THE THEATRICAL EVENING.

Tuesday evening the congress members and also a few hundred curious Bernese filled the Bern Variety Theatre to attend the two announced performances of "Patreco" (Fatherhood) and "Ginevra" (Genevieve). An operatic orchestra played an overture before the first drama and different pieces from Mozart, Boccherini and Haendel before each act of the second drama. The



S-INO HELENE BERTRIJN EL REĜA  
FLANDRA TEATRO  
(Speciala Fotografajo por Am. Esp.)

anojn kiuj ekskursis sur la Jungfraŭ Monto; kaj pro tio la teatra vespero finiĝis post noktomezo. Multaj bedaŭris, ke oni ne dediĉis du vesperojn por du teatraĵoj.

“Patreco,” de S-ino Wolf.

“Patreco” estas socia dramo france verkita de S-ino Wolf el Chau-de-Fonds (Svisujo) kaj sukcese ludita en tiu urbo dum la pasinta vintro. La aŭtorino kiu estas konata esperantistino, tradukis sian verkon esperanten kaj ĝin ludigis en Berno de la samaj aktoroj kiuj kreis la rolojn france. Tiuj aktoroj estas horloĝistaj laboristoj el tipaj familioj de tiu svisa regiono sur la monto Jura, kie la nacia industrio restas horloĝfabrikado. Tiuj gejunuloj havis nur kelkajn monatojn por lerni la lingvon kaj tre fervore prezentis la dramon, kvankam illa elparolado estis ankoraŭ ne sufiĉe korekta kaj iom malhelpis la plenan sukceson de la dramo antaŭ kongresa publiko, kiu jam kutimiĝis de

presentation commenced late to await the congress members who excursioned to the “Jungfrau” mountain; and on account of that the theatrical evening finished after midnight. Many regretted that two evenings were not dedicated to the two dramas.

“Patreco”—by Mme Wolf.

“Patreco” is a social drama written in French by Mme. Wolf from Chau-de-Fonds (Switzerland) and successfully played in that city during the past winter. The author, who is a famous Esperantist translated her work into Esperanto and had it played in Bern by the same actors who created the French roles. The actors are watch-makers from typical families of that Swiss region on the mountain Jura, where the national industry remains watch-making. Those young people had only a few months to learn the language and very fervently presented the drama, although their pronuncia-

kelkaj jaroj vidi profesiajn aktorojn. La dramo mem kaj ĝia temo meritas tre lertajn aktorojn. Ĝi pritraktas la sorton de junulino trompita kaj forlasita kun infaneto. La aŭtorino kurage atakas la hipokritan kaj maljustan sintenadon de la homoj en tiaj okazoj.

La detalajn cirkonstancojn de la dramo oni ne facile povas raporti en gazetartikolo. Ĉe la fino de la dramo, la kulpa viro Ernesto komprenas sian devon kaj rompante la antaŭjuĝojn de l' homoj kaj la hipokritan decidon de sia familio, li edziĝas kun la malfeliĉa knabino, Lucio, kiun li amas.

Jam ĉe la unua akto ŝia amikino Germaine esprimis la opinion de multaj indignaj virinoj dirante: "Ĝis nun oni ne sukcesis elradikigi tiujn antikvajn antaŭjuĝojn, kiuj neripareble senhonorigas la unuan, la malplifortan kompreneble, kaj ŝirmas kaj absolvas la alian, la pli fortan. Ĉu vi scias kiuj, plej kruele malestimas kaj malŝatas la kompatindajn forlasitinojn? Estas precize tiuj, kiuj devus ilin kompati kaj helpi: la virinoj. Jes, la bonaj burĝinetoj, al kiuj la vivo milde ridetis, unuaj sin deturnas de siaj malfeliĉaj fratinoj, kiuj estis kulpaj nur pro tio, ke ili fariĝis viktimoj de malhonestaj viroj."

La noblajn pensojn de la aŭtorino kaj la sindoneman laboron de la geludintoj oni varmege aplaudis dum Bernaj komitatanoj prezentis florbukedojn al S-ino Wolf, al S-ino Liehti (Lucio) al S-ino Reutter (Germaine) kaj al F-ino Brandt.

#### "Ginevra" de S-ro Edmond Privat.

Poste la unuan gravan originalan teatraĵon de nia esperanta literaturo ludis la samaj geaktoroj kiuj prezentis "Kaatje" en Antverpeno en 1911, inter alie la fama S-ino Bertrijn kaj S-ro Jules Versfraete anbaŭ el Reĝa Flandra Teatro. En sia lirika dramo "Ginevra" S-ro Privat prezentas la personojn de la malnova Kelto-Kimra legendo pri Reĝo Arturo kaj la Kavaliroj de la Ronda Tablo.

tion was still not entirely correct and somewhat detracted from the full success of the play before a congress audience, who already for several years had become accustomed to seeing professional actors. The drama itself and its theme merit extremely clever actors. It concerns the fortunes of a young girl deceived and abandoned with a little child. The author courageously attacks the hypocritical and unjust attitude of mankind in these cases. The detailed circumstances of the tragedy can not easily be reported in a magazine article. At the finish of the drama, the guilty man Ernest, understands his duty and breaking through the prejudiced opinions of men and the hypocritical judgment of his family, he marries the unhappy girl Lucio, whom he loved.

In the first act her friend Germaine expresses the opinion of many indignant women by saying: "Not yet has success been achieved in eradicating those antique prejudices which irreparably dishonor the one, the weaker naturally, and protect and absolve the other, the stronger. Do you know who most cruelly despises and hates the miserable abandoned ones? It is precisely those who should pity them and help them: the women! Yes, the good, little, middle-class women on whom life kindly smiles, first turn themselves away from their unhappy sisters who were guilty only in that they were made victims of dishonest men."

The noble thoughts of the author and the self-sacrificing work of the players, were warmly applauded, while Bern committee members presented bouquets of flowers to Mme. Wolfe, Mme. Liehti (Lucio), Mlle. Reutter (Germaine), and Mlle. Brandt.

#### "Ginevra"—by Edmond Privat.

Afterwards, the first important original play of our Esperanto literature was played by the same actors who presented "Kaatje" in Antwerp in 1911, among others the famous Mme. Bertrijn and Jules Versfraete, both from the Royal Flemish theatre. In his lyric drama "Ginevra" M. Privat presents the persons of the old Celtic-Welsh legend concerning King Arthur and the Knights of the Round Table.





**LA AKTOROJ DE "GINEVRA"  
KAJ LA AŬTORO, S-RO PRIVAT  
KUN EDZINO**

(Speciala Fotografajo por Am.  
Esp.)

Profundan impreson faris "Ginevra" sur la aŭdantaro kaj entuziasme oni ovacis la geaktorojn kaj la aŭtoron, al kiu oni donacis grandan laŭran kronon meze de fervora aplaŭdado. La fama flandra aktorino S-ino Bertrijn estis admirinde nobla kaj sincera Reĝino, S-ro Verstraete plej elokventa kaj brila Lancelot, S-ro Van der Velde tre mistika kaj supertera Reĝo Arturo. Inter la amatoraj kunludantoj, S-ro Jakobs tre bone sukcesis en sia malfacila rolo de Modredo, F-ino Herinckx estis aminda sekvantino, kaj S-roj Van Schoor kaj Schoofs tre noblaj kavaliroj.

Pro la granda sukceso de la dramo, la direktoro de la Rega Flandra Teatro, kiu venis Bernon por ĝin vidi, decidis ĝin traduki en la flandra lingvon kaj ĝin ludigi en sia teatro en Belgio. Ĉu oni ne povus D-ro Zamenhof persone dankis la aktorojn kaj proponis ke ili faru rondvojaĝon tra la mondo ludante la dramon en Esperanto. Ilia belsona elparolado kaj la belaj harmonie flujaj versoj de la verko estus plej bona propagandilo por nia lingvo.

**La Laboraj Kunsidoj De L' Rajtigita  
taj Delegitoj.**

Tri publikaj laborkunsidoj okazis dum la semajno, sub senpartia kaj energia prezidado de S-ro Ed. Stettler, vic-prezidanto de la kongreso. En la unua, S-ro rektoro Boirac, prezidanto de la Lingva Komitato de

"Ginevra" made a profound impression on the audience, and enthusiastically they applauded the players and the author, to whom in the midst of a fervent ovation was given a large laurel wreath. The famous Flemish actress Mme. Bertrijn was an admirably noble and sincere Queen, Versfraete, a most eloquent and brilliant Lancelot, Van der Velde a very mystical and supernatural King Arthur. Among the amateur players M. Jakobs succeeded very well in his difficult role of Modred. Miss Herinckx was a lovable lady-in-waiting, and Messrs. van Schoor and Schoofs extremely noble cavaliers.

As a result of the great success of the drama, the director of the Royal Flemish Theatre, who came to Bern to see it, has decided to have it translated into the Flemish language and produce it in his theatre in Belgium. Is not some one also able to translate it into English? Dr. Zamenhof personally thanked the actors, and proposed that they make a round-the-world voyage, playing the drama in Esperanto. Their beautiful pronunciation, and the harmoniously fluent verses of the work, would be the best kind of propaganda for our language.

**The Working Sessions of the Proxy  
Delegates.**

Three public sessions took place during the week under the impartial and energetic chairmanship of Ed. Stettler, vice-president of the Congress.

A very animated discussion breaks out on account of a proposal of General Sebert, that the delegates sent as proxies (rajtigita delegitoj) have a closed session, not open to the public. Messrs. Advokato Sergeant (France) Epstein (England) and Dr. Stromboli (Italy) protest against "secrecy" in these sessions. It is decided that this will be only a preparatory session.

In the second public meeting, General Sebert presents a report of the operations of the Central Office in Paris, and of the Administration Committee. The services of the Central office in Paris are from this time divided into two sections:

Section A (Secretary, G. Chavet) to take care of the Official Institutions, and to have published the documents of the Language Committee

la Esperantista Akademio, legas sian raporton pri la Lingva Komitato.

S-ro G-lo Sebert verkis pri la K. K. raporton, kiun resumas S-ro Chavet. Tiu raporto unue temas pri sendo de multaj oficialaj publikigaĵoj, due klarigas pro kiuj cirkonstancoj la IXa ne povis okazi en Genova, kaj nun sidas en la federacia urbo de Svislando. La oficialaj invitoj al la diversaj regnoj ne povis esti farataj, kiel de la aliaj naciaj registaroj ĉe la antaŭaj kongresoj; pro tio ne estas tiun jaron tiom da oficialaj statsenditoj.

Tre vigla diskuto ekfajras pro propono de Generalo Sebert, ke la rajtigataj delegitoj havu nepublikan kunsidon. S-roj Advokato Sergeant (Francujo) Epstein (Anglujo) kaj D-ro Stromboli (Italujo) protestas kontraŭ "sekreteco" de tiaj kunsidoj. Oni decidis ke ĝi estos nur prepara kunsido.

En la dua publika kunveno Generalo Sebert prezentas raporton pri funkciado de la Centra Oficejo en Parizo kaj de l' Administra Komitato. La servoj de la Centra Oficejo en Parizo estas de nun dividitaj en du fakoj: Sekcio A (Sekretario: S-ro Chavet) por zorgi la Oficialajn Instituciojn kaj publikigi la dokumentojn de la Lingva Komitato (L. K.) kaj Konstanta Komitato de la Kongreso (K. K.) Oficiala organo estas "Oficiala Gazeto".

Sekcio B (Sekretario: S-ino Ferter) por generala propagando, preparado de bibliografio kaj statistikoj. Organo estas "Informa Bulletin" kiu eldoniĝas en "Oficiala Gazeto".

S-ro Chavet legas la raporton pri generala organizaĵo. S-ro G-lo Sebert donas kelkajn klarigojn kaj diras, ke li korespondadis kun kelkaj naciaj societoj kaj ke la projekto ŝajnas akceptinda. Oni voĉdonas pri la jena propono: "La IXa Kongreso konsilas al la naciaj societoj aliĝi al la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj." La komisiono pri generala organizaĵo kaj la subkomisiono nun finis sian taskon kaj la sperto montros kiel povos funkciadi la provota Unuiĝo. Neniu kontraŭ batalis la projekton, ĉar oni proponis nur provi la aferon por kelkaj jaroj.

Pri la Venontaj Kongresoj.

Ĉe la tria kunsido oni diskutas du gravajn demandojn: 1. pri ĉiujara aŭ ĉiujara kongreso, 2. pri loko

and Constant Committee of Congresses. The official organ is the "Official Gazette."

Section B. (Secretary: Mme. Ferter) for general propaganda, preparation of bibliography and statistics. Organ is "Information Bulletin", which is published in the "Official Gazette."

M. Chavet reads the report about general organization, General Sebert gives a few explanations and says that he is corresponding with many national societies, and that the project seems worthy of acceptance.

The following proposal was voted: "The 9th Congress counsels the national societies to join the International Union of Esperanto Societies." The committee on general organization and the sub-committee has now finished its task and practice will show how the tentative Union will work. No one fought against the project because it has been proposed only to try the affair for a few years.

#### About Future Congresses.

At the third session two important questions were discussed: 1. About a yearly congress or one every two years. 2. About the location of the 10th and 11th Congress.

M. Chavet reports about both questions. An American, by letter, had proposed that we have only one Congress every two years because of the difficulty in making the yearly trip. Many speakers from different lands fought against the argument and also a letter against it was received from H. B. Mudie, in which he states that the propaganda and instruction value of the Congresses is so great that if possible many Congresses should be held yearly. Different people attend the different congresses. It is neither necessary nor well that the same should come always. The proposal for a congress every two years is not accepted.

Rollet de l' Isle president of the French Society for the Propagation of Esperanto and after him, Prof. Bricard, the new president of the Paris group, officially invite the 10th Congress to Paris and promise faithfully to work in order to carry out the cherished desire of their unfortunate friend Carlo Bourlet.

With admiration, was remarked the clear eloquence of Prof. Bricard.

de la Xa kaj Xla kongresoj.

S-ro Chavet raportas pri ambaŭ demandoj. Usonano proponis per letero al esperantaj gazetoj, ke oni havu nur unu kongreson ĉiudujare ĉar estas tro malfacile fari tian vojaĝon ĉiujare. La argumentojn kontraŭ batalas multaj parolantoj el diversaj landoj kaj ankaŭ letero de S-ro H. B. Mudie, kiu diras, ke la propaganda kaj instrua valoro de la kongresoj estas tiel granda ke oni devus havi eĉ multajn kongresojn ĉiujare se estus eble. Malsamaj personoj ĉeestas la diversajn kongresojn. Estas nek necese, nek bone, ke ĉiam nur la samaj alvenu. La propono de la Usonano estas malakceptita.

S-ro Rollet de l'Isle, prezidanto de la franca societo P. P. Esperanto, kaj poste Prof. Bricard, la nova prezidanto de l' Pariza Grupo, oficiale invitas la Xan Kongreson al Parizo kaj promesas fidele labori por efektiviĝi la karan deziron de sia bedaŭrata amiko Carlo Bourlet. Oni admire rimarkas la klaran elokventecon de Prof. Bricard, kies jusa apero en la publikan kongresan vivon tuj altiris al li ĝeneralan simpatian.

La Kongreso danke akceptas la inviton fari la Xan en Paris ĉe l' komenco de Aŭgusto 1914.

Poste S-ro Warden en la nomo de la Skotoj, invitas la Xian Kongreson al Edinburgh por somero 1915. Tiun afablan inviton la kongreso ankaŭ unuanime akceptas esprimante sian admiron al la fervoreco kaj lerteco de niaj skotaj samideanoj, kiuj el ĉiuj nacioj plejmultnombre ĉeestis la naŭ kongresojn.

Ĉar ankaŭ la Usonanoj invitas la Xian kongreson al San Francisko kaj ĉar bedaŭrinde tro malmultaj alilanduloj povos vojaĝi tien, la kongreso decidas esprimi sinceran bedaŭron kaj dankon al la Usonanoj pro illa afabla invito kaj ankaŭ esprimi la deziron ke ili organizos dum la Tutmonda Ekspozicio, grandan amerikan esperantistan kongreson, al kiu oni sendu kiom eble plej multajn fremdajn delegitojn kaj kunorganizigu grandajn publikajn propagandajn manifestaciojn.

Post parolado de S-ro Jakobs (Belgo) laŭ tiu senco, la kongreso voĉdonas unuanime tiun deziresprimon laŭ propono de S-roj Chavet kaj Privat.

Fine la kongreso ricevas por la

whose sudden appearance in the public congress life just now, called up to him general sympathy.

The Congress accepts with thanks the invitation to have the 10th in Paris at the beginning of August 1914.

After this Mr. Warden in the name of the Scots, invites the 11th Congress to Edinburgh for the summer of 1915. The Congress also unanimously accepts this affable invitation, expressing its admiration at the fervor and skill of our Scotch fellow-thinkers, who of all nations, have attended the nine congresses in the greatest number.

Because the Americans also invited the 11th Congress to San Francisco and unfortunately, because too few foreigners will be able to make the trip there, the Congress decides to express sincere regret and thanks to the Americans on account of their kind invitation, and also to express the desire that they will organize during the International Exposition, a great American Esperanto Congress, to which should be sent as many foreign delegates as possible, who would organize together a large public propaganda manifestation.

After a speech by M. Jakobs (Belgium) along that line, the Congress voted unanimously to express this desire according to the proposal of Messrs. Chavet and Privat.

Finally the Congress receives for the 12th in 1916 an invitation from Copenhagen (Denmark) and from the applause we can conclude that the invitation will be accepted in its proper time.

#### The Official Banquet.

Wednesday at 12 o'clock noon, six hundred Congress members sat around the tables splendidly decorated with flags and flowers in the great salon of the Casino Palace. The famous musical artist Karl Locher opens the feast by a magnificent recital of his improvisation of "La Espero."

A great ovation is given to Dr. and Mrs. Zamenhof on their arrival. During the whole meal all the guests mixing in the most international manner, enjoyed a very gay atmosphere. At dessert, Rene de Saussure speaks, to thank, first, our Master, his charming family and all congress members outside of Switzerland who were pleased to come to-

XIIa en 1916 inviton al Kopenhago (Danujo) kaj el la aplaŭdoj oni povas konkludi ke tiun inviton oni akceptos siatempe.

#### La Oficiala Festeno.

Merkredon, je la 12a tagmeze 600 kongresanoj eksidas ĉirkaŭ la festentabloj lukse aranĝitaj kun fiagoj kaj floroj en la salonego de l' kazino Palaco. La fama muzikverkisto Karl Locher malfermas la festenon per grandioza reludo de lia improvizaĵo pri "La Espero."

Granda ovacio estas farita al Gesinjoroj Zamenhof ĉe lia alveno. Dum la tuta tagmango ĉiuj gastoj plej internacie miksitaj ĝuis tre gajan atmosferon. Ĉe la deserto ekparolas S-ro de Saussure por danki unue nian Majstron, lian afablan familion kaj ĉiujn nesvisajn kongresanojn kiuj bonvolis veni al Berno por tiu kongreso. Je la nomo de la organizantoj li ankaŭ dankas la kunlaborantojn por la belarta parto de nia Kongreso, inter alie "la genian orgeniston, kiu nin ravis per sia majstra muziko, la famajn flandrajn geaktorojn, kiuj venis montri al ni unu fojon pli sian grandan talenton, kiun ni jam aplaŭdis en Antverpeno, la aŭtoron de Ginevra, nian esperantan poeton kies majstra verko restos grava monumento en nia originala literaturo, kaj fine al D-ro Zamenhof, kiu ne volas esti Majstro sed kiun niaj koroj nomas tio spite ĉiu malpermeso." S-ro Edmond Privat faras sian toston al la Sinjorinoj aludante "la kuraĝajn virinojn, kiuj batalas por pli egala kunlaborado de virinoj kun viroj al homa progreso." Li profitas la okazon por danki la sindonemajn gejunulojn kiuj ludis "Patreco" kaj ĝian aŭtorinon S-inon Wolf. Fine li dankas la geaktorojn de "Ginevra" kaj speciale S-inon Bertrijn "al kies talento la verko ŝuldas sian sukceson."

S-ino Bertrijn, la famkonata aktorino deklamas "Saluton al Zamenhof", improvizatan versaĵon de S-ro Privat. La aŭdantaro faras ovacion al la granda artistino.

S-ino Hankel, nia regino de Esperanta Literaturo dankas je la nomo de la virinoj por la ĵus farita toasto. Ŝi diras ke la du teatraĵoj enhavas noblan feministan idealon.

Kapitano Perogordo alportas la personajn salutojn de Lia Rega Moŝto Alfonso XIII, kiu petas specialan raportan viziton de lia sendito post

Bern for this Congress. In the name of the organizers, he also thanks the collaborators for the fine-arts part of our Congress, among others "the genius-organist who has entranced us by his masterly music, the famous Flemish actors, who came to show us once again their great talent, which we have already applauded in Antwerp, the author of "Ginevra" our Esperanto poet whose masterpiece will remain an important monument in our original literature."

He finally toasts Dr. Zamenhof "who does not wish to be 'Master' but whom our hearts name so, in spite of all prohibition."

Edmond Privat makes his toast to the ladies alluding to "the courageous women, who fight for more equal cooperation of women with men for the progress of mankind." He profits the occasion to thank the devoted young people who played "Patreco," and its authoress Mme. Wolf. Finally he thanks the actors of "Ginevra" and especially Madame Bertrijn to whose talent the work owes its success."

Madame Bertrijn, the well-known actress, declaims "A greeting to Zamenhof"—an improvised poem by Privat. The audience gives an ovation to the great artist.

Marie Hankel, our queen of Esperanto Literature, in the name of the women, expresses thanks on account of the toast just made to them. She remarks that the two theatrical presentations certainly contain a noble feminine ideal.

Capt. Perogordo carries the personal greetings of His Royal Highness Alfonso XIII, who requests a special report of his visit from his envoy after each Congress.

Col. Pollen, in the name of the British, Von Frenckell in the name of the Germans, Ghez for the Austrians toast in turn to the beautiful land of Switzerland, the Swiss friends, the city of Bern, etc.

Dr. Stromboli assures the Congress members that the volcano has not been extinguished and that Stromboli still lives!

Mr. Fisher, the well known writer from Tifis (Caucasia) speaks in the name of the Russians and Mr. Herbert Harris, the congenial delegate from Maine makes an eloquent toast in the name of Americans.

ĉiu Kongreso.

Kolonelo Pollen je la nomo de la Britoj, S-ro von Frenckell je la nomo de la Germanoj, S-ro Ghez por la Istrianoj, toastas siavice al bela lando Svisujo, la svisaj amikoj, la urbo Bern, ktp.

D-ro Stromboli certigas la kongresanojn ke la vulkano ne estingiĝis kaj ke Stromboli ankoraŭ vivas!

S-ro Fiŝer, la konata verkisto el Tiflis (Kaŭkazo) parolas je la nomo de Rusoj, kaj S-ro Herbert Harris, la simpatia delegito de ŝtato Maine, faras elokventan toaston je la nomo de Usonanoj.

Fine fajroplena bulgara studento S-ro Krestanof salutas "belan pacan Esperantuĵon je la nomo de dolorplena Balkanujo profunde vundita de interfrata batalado. Nobla spirito de Esperantismo povu nun superblovi mian malfeliĉan landon!" Post tiuj impresaj vortoj la aŭdantaro starigas por kanti "La Esperon". Finiĝis la festeno.

#### La Laborkunsidoj de U. E. A.

Tri publikajn kunsidojn havis U. E. A. post la solena malfermo de sia kongreso. Tre multnombra estis ĉiam la ĉeestantaro. Tiun ĉi jaron, eĉ foje pli multnombra ol ĉe la generalaj kunsidoj de l' kongreso. Plej diverslandaj oratoroj diskutis pri la prezentitaj raportoj, kiujn la kongresanoj antaŭricevis zorge presitajn en 70-paga "Oficiala Dokumentaro de la 4a kongreso de U. E. A."

La plej interesa raporto estis unue tiu de S-ro Hodler pri la funkciado de U. E. A. Ĝi lerniĝis al ni ke de 1909 ĝis 1912 U. E. A. faris 32,789 servojn (8,166 por komerco; 1,643 al junuloj; 3,945 por turismo; 5,945 al vojaĝantoj; 13663 por diversfaka informado. Prave diris iu parolanto ke tre malmultaj eĉ plej gravaj internaciaj societoj faris jam tiel multe.

La nombro de korespondadoj de la Delegitoj dum la sama periodo estis 65,030 kaj ĉe la Geneva Oficejo 99,382. Aperis pri U. E. A. 2,660 artikoloj. Fariĝis pri U. E. A. 1,740 paroladoj. Partoprenis ĉe 2,627 esperanto-kursoj raportitaj de la Delegitoj 45,553 personoj.

En 1912 U. E. A. havis delegitojn en 1179 urboj (1000 en Eŭropo, 116 en Ameriko, 23 en Azio, 20 en Afriko

Finally, full of fire, a Bulgarian student, Krestanof, salutes "beautiful, peaceful, Esperanto land in the name of the unhappy Balkans, deeply wounded by internal war. A noble spirit of Esperantism can now hover over my unhappy land." After those impressive words the audience stands to sing "La Espero." The banquet was finished.

#### The working Sessions of U. E. A.

After the formal opening of its Congress, U. E. A. held three public sessions.

This year the attendance was always large, even at times numbering more than at the general sessions of the Congress.

Orators from most diverse lands discussed the reports presented, which the Congress members had received carefully printed in a seventy-page "Collection of official documents of the fourth U. E. A. Congress."

The most interesting report was first that of Mr. Hodler, about the working of U. E. A. It informed us that from 1909 until 1912 U. E. A. had performed 32,789 services (8,166 for commerce; 1,643 for young people; 3,945 for touring; 5,945 for travellers, 13,663 for information on divers subjects). Some speaker correctly remarked that very few of even the most important international societies had done as much.

The amount of correspondence of the delegates during the same period numbered 65,030 and at the Geneva Office 99,382. About U. E. A. has appeared 2,660 articles. 1740 speeches were made about U. E. A. 45,553 persons took part in 2,627 Esperanto courses reported by the Delegates.

In 1912 U. E. A. had delegates in 1179 cities (1000 in Europe, 116 in America, 23 in Asia, 20 in Africa, and 20 in Oceania). These figures were increased during the early part of 1913.

During the Congress, U. E. A. acquired its hundredth guarantor and now possesses a guaranty capital of \$4,000 to facilitate its work. Already 6,000 persons have renewed to U. E. A., in spite of the doubling of the fee from twenty-five cents to fifty cents. Messrs. Hodler and

kaj 20 en Oceanio). Tiuj ciferoj ankoraŭ plimultiĝis dum la komenci-ta jaro 1913.

Dum la kongreso U. E. A. akiris sian centan garantianton kaj nun posedas garantian kapitalon de Sm. 8,000 (\$4000.) por faciligi ĝian funkciadon. Jam 6000 personoj realiĝis al U. E. A. malgraŭ la duoblo de la kotizaĵo de Sm. 0, 50 (25c) ĝis Sm. 1 (50c). S-roj Hodler kaj Stettler esprimis la esperon ke oni varbu almenaŭ 2000 pliajn membrojn ĝis fino de la jaro.

Oni diskutis raporton pri unueco en la ekzamenoj por esperanto-diplomoj. Oni voĉdonis deziresprimon por ke komisiono estu elektata kun tiu celo. S-ro Privat klarigis ke jam interkonsento ekzistas inter Internacia Instituto de Esperanto kaj kelkaj naciaj societoj. La kongreso esperas ke tiaj interkonsentoj fariĝos ankoraŭ pli ĝeneralaj.

Prof. Rousseau prezentis tre interesan raporton pri U. E. A. kaj Sovinismo, montrante kiamaniere oni povus malhelpi publikigon de falsigitaj dokumentoj celantaj eksciti la popolojn unu kontraŭ la alia. Tre vigla diskuto sekvis kaj la kongreso petis la komitaton redakti deziresprimon laŭ la senco de la raporto.

Raporto de S-ro Perez (Hispano) rekomendis ke oni varbu anojn al U. E. A. ankaŭ ekster la esperantistoj, montrante al la publiko la tujan utilon kaj profiton de Esperanto per ĝiaj praktikaj servoj. Kolonelo Pollen gratulis U. E. A. pro ĝia nova Hotelo servo, kiu montriĝis tre utila al vojaĝantoj.

F-ino Moreau (el Bruselo) rekomendis ke oni pilfortigu la fakon de Konsulinoj por virinoj kaj S-ro Stettler konsilis ke oni interkonsentu kun la Asocioj por protektado de vojaĝantaj junulinoj. Diskuton pri la grava raporto de Poŝtdirektoro Behrendt (Germano) por internacia poŝtmarko, oni devis prokrasti ĝis proksima kongreso, pro manko de tempo.

La kongreso de U. E. A. fermiĝis Vendredon matene post tre interesa laboro plenumita. Oni vere sentas nun ke esperantismo estas tre serioza afero kaj fariĝas kalkulinda potenco en nia moderna mondo.

Stettler expressed the hope that they should enlist at least two thousand and more members before the end of the year.

They discussed a report about unity in the examination for Esperanto diplomas. It was voted to express a desire that a committee be elected with that aim. Mr. Privat explained that already a mutual agreement existed between the International Institute of Esperanto and several national Societies. The Congress hopes that such agreements will be made still more general.

Prof. Rousseau presented a very interesting report about U. E. A. and jingoism, showing in what manner one would be able to hinder the publication of false documents aiming to excite the peoples, one against the other. A very spirited discussion followed and the Congress requested the Committee to draw up a desire expressed according to the sense of the report.

A report of M. Perez (Spain) recommended that they should enlist members into U. E. A. outside of Esperantists also, showing to the public the immediate use and profit of Esperanto by means of its practical services.

Col. Pollen congratulated U. E. A. on account of its new hotel service, which was shown to be very useful to travelers.

Mlle. Moreau (Brussels) recommended that they should strengthen the branch of lady consuls for women and M. Stettler suggested that they should mutually arrange with the associations for protection of traveling young girls. A discussion about the important report of Postal director Behrendt (Germany) for an international postage stamp was necessarily postponed until the next Congress on account of lack of time.

The Congress of U. E. A. was closed Wednesday morning after very interesting work had been accomplished. One truly feels now that Esperantism is a very serious affair and has become a power worthy of calculation in our modern world.

#### A Family Tea With M. Pichon.

The young French student, Rene Charles Pichon, who won the first prize in the oratorical contest had the excellent idea to invite about 40

**Familia Temanĝo ĉe S-ro Pichon.**

La juna franca studento Rene Charles Pichon kiu gajnis la unuan premion ĉe la oratora konkurso, havis la bonan ideon inviti ĉirkaŭe 40 geamikojn kaj eminentulojn por familia temanĝo kun si en terasa ĉambro de l' kazino. Post amika bablado, D-ro Zamenhof dankis la afablan invitinton pro tiu kunveneto "unu el la plej agrablaj—ĉar plej intimaj—momentoj en la tuta Kongreso".

S-ro Privat gratulas S-ron Pichon pro lia sukceso ĉe la konkurso kaj salutas en li novan elokventan oratoron. S-ino Marie Hankel en danka paroladeto memorigas pri simila festeto en Barcelono en 1909 okaze de la 20-jara naskiĝtago de S-ro Privat. Ŝi gratulas la junulojn ke ili kuragiĝis iniciati tiel ĉarmajn festetojn! Kolonelo Pollen toastas al longa vivo de S-ro Pichon kaj al baldaŭa aldonado de ĉarma Sinjorino Pichon.

La juna invitinto, dankinte ĉiujn parolintojn, certigas Kolonelo Pollen, ke li principe aprobas lian lastan proponon kaj ĝin pripensos zorge en la estonteco.

**La Franco-Germana Manifestacio kaj la Mondamikiĝo.**

La lastan vesperon de la kongreso, ĉe fino de la Sabata Koncerto, okazis grava manifestacio, prezidata de S-ro Edmond Privat. S-ro Harrison Hill, speciala sendito de Lia eksurbestra Moŝto de Londono, Sir Vezey Strong, legas sendparolon de tiu eminenta amiko de Esperanto. Sir Vezey Strong dankas la esperantistajn gazetojn kiuj bonvolis represi lian alvokon por Mondamikiĝo kaj esperas ke la tuta mondo sekvos la ekzemplon de "felica familio de l' esperantistoj", kiu plej bele realigas internacian amikecon.

D-ro Zamenhof ovacie aklamata, diras sian simpatian al la persono kaj al la Societo de Sir Vezey Strong kiu disvastigas la ideojn de alia granda amiko de nia afero la bedaŭrata W. T. Stead per kies nomo titoliĝas la lokaj kluboj de la Societo por Mondamikiĝo. D-ro Zamenhof esperas ke ĉiuj esperantistoj helpos la movadon iniciatitan de Sir Vezey Strong.

En la nomo de siaj germanaj samideanoj kaj en la nomo de multnombra parto de la tuta germana popolo,

friends and notables to a family tea with him in a terrace room of the Casino. After a friendly chat Dr. Zamenhof thanked the affable host for this little gathering "one of the most agreeable because most intimate moments in the whole Congress."

Mr. Privat congratulated Pichon on account of his success in the contest and salutes in him a new, eloquent orator. Marie Hankel in a little speech of thanks remembers about a similar little party in Barcelona in 1909, the occasion of the 20th birthday of Edmond Privat. She congratulates the young people that they have the courage to originate such charming little feasts. Col. Pollen toasts to a long life for M. Pichon and to the early addition of a charming Mme. Pichon.

The young host, having thanked all speakers, assured Col. Pollen that he especially approved his last proposal and will carefully think about it in the future.

**The French-German Demonstration and the Promotion of World Friendship.**

The last evening of the Congress at the close of the Sunday Concert an important demonstration took place, presided over by Edmond Privat. Harrison Hill, Special Envoy of ex-mayor of London, his Honor Sir Vezey Strong, reads a speech sent by that eminent friend of Esperanto. Sir Vezey Strong thanks the Esperanto magazines who were pleased to reprint his call for the promotion of World Friendship and hopes that the whole world will follow the example of "the happy family of esperantists" who most beautifully realize international friendship. Dr. Zamenhof, after a great ovation, announces his accord with the person and the society of Sir Vezey Strong who disseminates the ideas of another great friend of our cause, the mourned W. T. Stead in whose name the local clubs of the Society for the Promotion of World Friendship have been called. Dr. Zamenhof hopes that all Esperantists will help the movement initiated by Sir Vezey Strong.

In the name of his German fellow-thinkers and in the name of a large part of the whole German people, Patent Advocate Schiff, president of

S-ro Patentadvokato Schiff, prezidanto de la Berlina Gruparo esperantista, faras elokventan paroladon kaj speciale salutas la reprezentanton de Francujo, la nobla lando de belarto kaj progreso kies amikecon plej multaj Germanoj tutkore deziras.

Al tiuj belaj paroloj respondas Generalo Sebert, ano de l' Franca Akademio de Moralaĵ kaj Politikaĵ Sciencoj. "La Francaj esperantistoj neniam forgesis la belan akcepton de la Germanoj ĉe la Dresdena Kongreso kaj ili tutkore ĝojos ilin siavice akcepti en Parizo venontan someron. Ni danku Esperanton, kiu ebligas la du grandajn naciojn pli bone koni kaj estimi unu la alian."

Tiam Generalo Sebert publike premas la manon de S-ro Schiff. Ĉe la vidaĵo de tiuj du eminentaj reprezentantoj de la du historie interbatalintaj landoj, la Franca Generalo kaj la Germana konsilanto kunigita per amika manpremo, la tuta kongreso akklamante levigas pro entuziasmo kaj ekkantas "La Esperon". Profunde impresa estas tiu bela momento.

Kolonelo Pollen jam ekstaris inter ambaŭ viroj metante ankaŭ sian manon en iliajn. Multaj ĉeestantoj ekpensas ke se nur la tri popoloj Franca, Germana kaj Brita povus tute libere kaj rekte diri sian opinion sen helpo de diplomatoj, ili kredeble agus kiel tiuj tri esperantistoj kaj tiel fine certigus eternan pacon en Eŭropo. Antaŭ kaj post tiu manifestacio pli ol 400 esperantistoj aliĝis dum la kongreso al la Societo por Mondamikiĝo subskribante sur listoj kun jena teksto:

Societo por Mondamikiĝo  
Prezidanto; La tre honorinda Sir  
Vezey Strong

Lia Honorinda Moŝto Sir Vezey Strong, urbestro de Londono dum kronadjaro 1911, reĝa konsilanto, honora komitatano de U. E. A. dankas vin ĉiujn pro via efika kunhelpado al tutmonda amikiĝo per via esperanta laboro kaj petas ke vi bonvolu afable doni al li vian adreson por ke li povu poste komuniki al vi per Esperanto novaĵojn pri progreso de tiu nobla movado.

Per tia subskribo vi senpage aliĝas al la Societo por Mondamikiĝo kiu havas nek regularon nek kotizaĵon sed nur laŭvole

the Berlin Esperanto Groups, makes an eloquent speech and especially greets the representative from France, the noble land of Fine Arts and Progress whose friendship most Germans whole-heartedly desire.

To these beautiful talks General Sebert, member of the French Academy of Morals and Political Sciences, replies: "The French Esperantists will never forget the beautiful reception by the Germans at the Dresden Congress and with all their hearts they will be glad in their turn to receive them in Paris the coming summer. We must thank Esperanto which makes it possible for these two great nations to know and to esteem each other better."

Then General Sebert publicly takes the hand of Mr. Schiff. At the sight of those two eminent representatives of the two historically contending lands—the French general and the German councillor united by a friendly hand shake,—the whole Congress arose in its great enthusiasm and sang "La Espero."

That beautiful moment is profoundly impressive.

Col. Pollen had already stood between both men placing also his hand in theirs. Many who were there think that if only the three peoples: French, German, and British could freely and correctly give their own opinion without help of diplomats they undoubtedly would act as those three Esperantists and so at last insure eternal peace in Europe. Before and after this demonstration more than four hundred Esperantists affiliated during the Congress with the Society for the Promotion of World Friendship, signing on lists having the following text:

Society for the Promotion of World  
Friendship.

President: The Right Honorable Sir Vezey Strong.

His Honorable Highness, Sir Vezey Strong, mayor of London during coronation year, 1911, Royal Councillor, Honorable committee member of U. E. A., thanks you all for your effective co-operation to promotion of world friendship by means of your Esperanto work and requests that you have the good will to give to him (on this paper) your address in order that he afterwards may be able to



enskribas ĉiujn homojn kiuj libere deziras pli generalan popolan disvastigon de la kono pri internaciaj aferoj kaj de la ideo pri amikeco inter ĉiuj nacioj.

(Ni tre volonte transdonos aliĝojn de tiuj, el niaj legantoj, kiuj sendos al ni sian subskribon por tio. Red.)

### Specialaj Kunsidoj

Dum la tuta kongresa semajno okazis en la Universitato multaj internaciaj kunvenoj de samĉelanoj el diversaj landoj.

Dufoje kunvenis la Socialistoj sub prezidado de S-roj Tesch kaj Couteaux. Trifoje kunsidis la Studentoj sub prezido de S-ro Krestanof kaj kun ĉeesto de la estro de l' Berna Universitato Rektoro Prof. Gmur.

S-ino Tiard gvidis kunvenojn de la Teozofoj, kaj D-ro Uhlmann prezidis de la Ordeno por Etika kaj Kulturo, kie ĉeestis D-ro Zamenhof kaj kie oni decidis labori pro lia ideo "Homaranismo".

La Kuracistoj kunvenis sub prezido de Prof. Jameson Johnston el Dublin; la Instruistoj sub gvidado de S-ro Jakobs el Antverpeno, kaj la Literaturistoj ĉirkaŭ S-ino Marie Hankel, la konata Reĝino de Poezio.

Multnombra publiko ĉeestis la ekzamenojn de la Internacia Instituto de Esperanto, kies ĵugantaro konsistis el S-roj Privat, Meyer kaj Ghez. Fine grava publika kunsido de la Scienca Asocio allogis en ĉambro de l' kazino multajn ĉeestantojn por aŭdi sub prezido de Prof. Cotton el Pariza Universitato, paroladojn de D-ro Marchand pri alpa floraro kaj de D-ro Stromboli pri ferindustrio.

### La Koncertoj kaj la Balo

Merkredon kaj Sabaton vespere okazis du grandaj koncertoj en la Kazino. Ĉe la unua oni aplaudis ĉefe la grandan Bernan Virhoron, en kiu kantas 200 viroj. Ĉe la dua oni speciale admiris svisajn gimnastikistojn, kiuj faris laŭ muziko belegajn ekzercojn kaj jonglaĵojn kun esperantaj flagoj kaj lumaj torĉoj.

Ankaŭ ĉe la balo kantis viroj en svisaj kostumoj kaj "jodlis" (speciala montana fajfado) kun granda sukceso. Ĉe tiu balo dancis granda amaso da esperantistoj en naciaj kostumoj. Oni rimarkis multajn belajn Bernaninojn, gemontanojn el

communicate with you by means of Esperanto about the progress of this noble movement.

By means of such a signature you become, without charge, a member of the Society for the Promotion of World Friendship, which has neither regulations nor membership fee, but only takes in according to their wishes all men who freely desire a more general scattering among people of the knowledge of international affairs and of the idea of friendship between all nations.

(We will willingly transfer the names of those of our readers who will send to us their signature for this purpose.—Ed.)

### Special Sessions.

During the entire Congress week, many international meetings of people of the same aims (from different lands) took place in the University.

The Socialists held two meetings presided over by Messrs. Tesch and Couteaux. The Students, under the times, and had among the attendance leadership of Krestanof, met three the rector of the Bern University Prof. Gmur.

Mme. Tiard had charge of the meetings of the Theosophists and Dr. Uhlmann presided at those sessions of the Order for Ethics and Culture, which were attended by Dr. Zamenhof and where it was decided to work for his idea—Humanity.

The physicians met, led by Prof. Jameson Johnston of Dublin. The teachers under guidance of M. Jakobs of Antwerp and the Literary people surrounded Marie Hankel, the famous Queen of poetry.

A large public audience attended the examinations of the International Institute of Esperanto whose judges consisted of Messrs. Privat, Meyer, and Ghez.

Finally an important meeting of the Science Association (presided over by Prof. Cotton of Paris University) attracted a large audience into a room of the casino to hear speeches by Dr. Marchand about Alpine flowers and by Dr. Stromboli about the iron industry.

Apenzell, Bavarinojn, Slovakojn, Flandrajn kamparaninojn, Provencajn virinojn kaj Litovajn vilaĝanojn. Estis ankaŭ granda grupo da Elzacaj gejunuloj kaj kelkaj valaĥinoj en belaj silkaj kostumoj. Tre malofta kaj pentrinda estis tiu milkolora vidaĵo, kiun admiris sufiĉe vasta grupo da viraj kongresanoj en proza ordinara frako kaj blanka kravato, inter alie la simpatia grupo de l' delegitoj el Malajaj Insuloj, kiuj ne volis veni en sia nacia kostumo. Oni dancadis ĝis frua mateno la postan tagon. Noktomeze la dancintoj ricevis ĉe la bufedo tre riĉan noktomanĝon.

#### Ekskurso al Interlaken

Jaudon matene, milo da kongresanoj veturis per speciala vagonaro ĝis Thun, kie ilin atendis speciala vaporŝipo, sur kiu ili trairis la Thunan lagon ĝis Interlaken. Tie multaj disigis por suprenrampi aŭ "funikulari" sur la najbaraj montoj. La ceteraj ĉeestis belegan prezentadon de "Wilhelm Tell" sur liber-aera scenejo. Plu ol 200 ludantoj kun riĉaj mezepokaj kostumoj donis al tiu popola ludado mirinde belan aspekton.

Vespere ĉiuj en Interlaken aŭdis belan sinfonian koncerton, kaj poste admiris ekstere ĝeneralan verdan artfajraĵon en honoro de l' kongreso. Noktomeze revenis Bernon la lasta vagonaro plena je laceguloj, kiuj rakontis unu al la alia mirindajn vidaĵojn de negaj montoj, de impo- nantaj glaciejoj kaj teruraj akvo- faloj vizititaj dum la posttagmezo.

#### La Oratora Konkurso.

Sabaton matene okazis en la kazino antaŭ granda aŭdantaro la anoncita oratora konkurso. Bonegan ideon havis la organizantoj de la kongreso anstataŭi per tio la kutiman literaturan konkurson. "Al virinoj plaĉas io nova" kaj ankaŭ al Esperantistoj. La juĝantaro konsistis el S-roj Venger, Privat, Perogordo, Warden kaj S-ino Hankel. Partoprenis tiun konkurson du sinjorinoj kaj ses sinjoroj. Ĉiu kandidato rajtas paroli dum 10 minutoj, elektinte unu el tri proponitaj temoj du horojn antaŭe.

S-ro Dalmaŭ, kataluno, parolas pri "Kuraĝo" kun multaj komparoj laŭ sudlanda maniero.

Jen juna Franco S-ro Pichon

#### The Concerts and the Ball.

Wednesday and Saturday evenings two large concerts took place at the Casino. At the first was applauded chiefly the great Bern Men's Chorus in which sang 200 men. At the second was specially admired Swiss gymnastists who, with musical accompaniment, performed beautiful exercises, and did sleight-of-hand tricks with Esperanto flags and torch lights.

Also at the ball, men in Swiss costumes sang and "yodeled" (special mountain whistle), with great success. A large number of esperantists danced in national costumes. One noticed many beautiful young ladies of Bern, mountain people from Apenzell, girls from Bavaria, Slav and Flemish country women, Provençal and Lithuanian villagers.

There was also a large group of young people from Alsace-Lorraine and several Chinese in beautiful silk costumes. Very unusual and worthy of painting was that thousand-colored view which was admired by a sufficiently large group of men Congress members in prosaic ordinary frock coat and white cravats, among them a congenial group of delegates from the Malay Islands who did not wish to come in their national costume. They danced until early morning the following day. At midnight the dancers received at the buffet a very enjoyable lunch.

#### Excursion to Interlaken.

Thursday morning a thousand Congress members rode by special train to Thun, where a special steamer awaited them, on which they went through the Thun Lake to Interlaken. There many separated to climb up or take the incline railway to the neighboring mountains. The others attended a beautiful presentation of "William Tell" in open air setting. More than two hundred players with rich costumes of the Middle Ages gave to that Folk-play a wonderfully beautiful aspect.

That evening, all in Interlaken Concert Hall heard a beautiful symphony concert and afterwards outside admired the green fire illuminations in honor of the Congress. At midnight the last train full of tired voyagers returned to Bern, all re-

toastas al "Patrujo" en plej tipa franca filozofe kaj literature elokventa maniero.

S-ino Tropeolo, tre modesta Francino, klare kaj delikate parolis pri "Legado de seriozaj libroj".

S-ro Jakobs, belgo, kiu ludis la rolon de Modredo en "Ginevra" faris energian kritikparolon "Kontraŭ la mortpuno." Alia Belgo, S-ro Van Schoor, redaktoro de "Belga Esperantisto" faris toaston al "Homa Frateco."

Angla sufragistino, S-ino Wright, tre interesis la aŭdanton traktante la temon: "La valoro de sano" per tre klaraj vortoj.

S-ro Mahn el Breslaŭ (Germanujo) faris paroladon plenan je profundaj ideoj por laŭdi "iun heroon de l' historio". Lia heroo estis Zamenhof kies moralan rolon en la mondo li tre lerte analizis.

Fine S-ro Raczi, Hungaro, parolis pri "Protekto de la infanoj," donante tre gustajn kaj flue esprimitajn pensojn.

S-ro Wenger fermas la konkurson, kaj sciigas, ke morgaŭ matene ĉe la ferma solena kunsido de la Kongreso la premioj estos disdonataj al la konkurstantoj, kaj antaŭe la vic-prezidanto de l' jugistaro, S-ro Edmond Privat, la majstro de l' esperanta parolo, havigos al la ĉeestantoj novan ĝuon.

#### Solena ferma kunsido de la Kongreso.

